# Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro 1 : 2025

## ONI NE RAJTAS RICEVI KOMPENSON, SE RABO OKAZIS KUN LA HELPO DE KOMIZO ĈE JUVEL-VENDEJO



Juĝo prononcita de la Hispana Supera Tribunalo ĵus liberigis al asekura kompanio de la devo mon-kompensi al juvel-vendejestro, pro rabo de 133.000 eŭroj en kies organizado partoprenis unu el la komizoj de la vendejo.

Antaŭ kelkaj jaroj mastro de juvel-vendejo subskribis aserkur-kontrakton. Unu el la klaŭzoj de tiu kontrakto disponis, ke ne estus devige pagi kompenson, se ebla damaĝo okazus pro mal-fideleco de la laboristoj aŭ kunlaborantoj de la vendejo.

En la jaro 2024, du armitaj homoj eniris en la juvel-vendejon kaj ili rabis juvelojn kaj horloĝojn. Post polica priesplorado oni eltrovis, ke la rabistoj ricevis informojn kaj helpon de unu el la komizoj de la vendejo. La komizo eĉ estis poste enkarcerigita pro tiu agado. La mastro de la juvel-vendejo petis mon-kompenson al asekur-kompanio, kiu rifuzis tiun peton pro la fakto, ke la ŝtelo okazis pro la nepra agado de unu el la laboristoj de la vendejo. Tribunalo kondamnis al asekur-kompanio pagi paktitan kompenson, ĉar la rabo efektive okazis, tiam helpo kaj kunlaborado de la komizo estis esenca. Do, oni povis konsideri, ke ŝi partoprenis en la rabo, eĉ se ne en la akto mem.

Tamen nun, la Hispana Supera Tribunalo nuligis ĉi tiun unuan juĝon, do, oni liberigas al asekur-kompanio de la devo mon-kompensi pro la rabo okazita. La supera tribunalo asertis, ke la hispana leĝaro pri asekurado diras, ke oni ne povas mon-kompensi se la asekurato, familio aŭ kunlaborantaro, ne metas la necesan prizorgon por eviti damaĝojn. Ĉi-kaze, rabo okazis pro la agado de unu el la laboristinoj de la vendejo, do, kunlaboranto de la asekurato. Pro tio, oni ne rajtas ricevi mon-kompenson se la mastro ne metis la necesajn prizorgojn por eviti tiun rabon, kaj sendube viglado de la komizaro estis necesa prizorgo.

# Vorto de la Semajno

**DEMISII**

Volonte forlasi oficon aŭ rangon.

Sinonimoj: *abdiki, eksiĝi.*

*Pro la parlamenta rifuzo la registaro demisiis.*



# Internacia kalendaro

**3-an de novembro**: *Festo de la apartiĝo de Panamo.*
**4-an de novembro:** *Tago de UNESKO.*
**6-an de oktobro**: *Festo de la rusa revolucio.*